# BULTENO
## DE LA INTERNACIA LABOR-OFICEJO

N-ro 41 — Februaro — 1931

Aperas ĉiudumonate kiel aldono al « ESPERANTO » — Redaktejo: BUREAU INTERNATIONAL DU TRAVAIL, GENEVE

**TEKSTO: La rolo de la Internacia Labor-Oficejo en la movado por eŭropa unuiĝo. — La ekonomia krizo en Usono kaj Kanado. — Paĝo pri kooperado.**

# La rolo de la Internacia Laboroficejo en la movado por Eŭropa unuiĝo

La movado por eŭropa unuiĝo, kiu materialiĝis dum januaro 1931 en Ĝenevo okaze de la kunveno de speciala komisio ĉe la Ligo de Nacioj, tuŝas la internacian Labororganizon per pluraj flankoj. Malgraŭ la fakto ke ĉiuj problemoj pritraktitaj de la Organizo havas verdire tutmondan karakteron, ekzistas inter ili kelkaj kiuj prezentas pli specialan intereson por la eŭropa kontinento kaj kies solvo povus esti facilitigata per eŭropo kunlaboro.

Kelkaj el tiuj problemoj estas prezentataj en raporto de la Internacia Laboroficejo, submetita al la Enketa Komisio por la Eŭropa Unuiĝo pere de la ĝenerala Sekretario de la Ligo de Nacioj.

Ĉar tiu raporto priparolas problemojn tre gravajn por la socia kaj ekonomia progreso de Eŭropo, ni ĝin publikigas ĉisube nur malmulte mallongigita.

### Ekonomia kunlaboro kaj socia progreso.

La laborista mondo, kies protektadon la internacia Laboroficejo prenis sur sin, ne povas resti indiferenta antaŭ ia projekto por eŭropa unuiĝo; aliaflanke tia projekto ne povas realiĝi aŭ sukcesi sen ĝia kunhelpo.

Ia agado celanta la elvolviĝadon kaj tieldire la raciigon de la kunlaboro inter la eŭropaj nacioj devas plibonigi la produktokapablon de Eŭropo, kaj la laboristoj povas profiti de tiu plibonigo en diversaj manieroj.

Estas konata fakto ke la aĉetopovo de la laboristoj, en aliaj vortoj ilia salajro, ĉiam kreskas kiam la ĝenerala progreso de la produktado pligrandigas la rezervojn troviĝantaj je la dispono de la komunumo. Ĉiu progreso ebligata per pli granda libereco aŭ pli bona reguligo en la cirkulado de la komercaĵoj, aŭ per la multobligo aŭ disvastigado de la merkatoj, stabiligo de la komercaj kondiĉoj, pli bona distribuo de produktado celante ekvilibron kun la naciaj eblecoj, pligrandigo de industria produktado aŭ plibonigo de terkulturaj metodoj, k.t.p., povas kaj devas plibonigi la vivmanieron de la kamparaj kaj urbaj laboristoj.

Plie la amasiĝo de nova riĉaĵo en la Malnova Mondo faciligos la solvon de multaj sociaj problemoj, ĉar nuntempe estas la financaj malfacilaĵoj de la ŝtatoj kaj de la industrioj kiuj minacas haltigi, aŭ almenaŭ prokrasti la progresojn de la diversaj sociaj reformoj. La plimultigo de kapitalaj aktivoj kiel rezultato de pli racia utiligo de eŭropaj produkto-eblecoj faciligos la vojon al novaj sociaj reformoj, kaj tiuj siaflanke helpos doni novan puŝon al ekonomia vivo eŭropa pere de la pligrandigo de la produkto- kaj konsumo-kapablo de la popolo.

Pro ĉio tio estas certege ke en tiu problemo, kiel en multaj aliaj, ia ekonomia progreso necesigas ankaŭ socian progreson, kaj tio ne povas ne interesi la internacian Laboroficejon.

### Problemoj esence eŭropaj.

La listo de la problemoj jam studataj de la internacia Laboroficejo kun la celo helpi al ilia solvo entenas kelkajn problemojn kies esenco estas precipe eŭropa.

Certe, estas neeble certigi ke iu ajn problemo nure interesas Eŭropon. La principo mem de la internacia Labororganizo, kiel ankaŭ de la Ligo de Nacioj, estas la tutmondeco, kaj ekzistas verŝajne nenia laborproblemo kiu interesas nur tian aŭ alian kontinenton. Sed ekzistas malgraŭ tio problemoj kiuj interesas pli multe Eŭropon ol alajn partojn de la mondo. Ĉi-tiu raporto pritraktos la tiaspecajn problemojn, pri kiuj la internacia Labororganizo jam okupiĝis.

### La krizo de la karbo.

Ekzistas industrio kiu nepre bezonas reguligon de la laborkondiĉoj, ne nur en Eŭropo, certe, sed unue kaj kiel eble plej baldaŭ en tiu-ĉi kontinento. Estas la karbomineja industrio. La karbo krizo unue efikis en Eŭropo, kaj la bezono de ekonomia akordo estas plej urĝa en la kazo de la eŭropaj karboproduktistoj. Sed ekonomia akordo nur estas ebla kune kun akordo pri la laborkondiĉoj.

Pro tio, la Administra Konsilantaro de la internacia Laboroficejo decidis, kiam la kunveno de la Ligo de Nacioj en septembro 1929 en Genève komisiis ĝin sin okupi pri la afero, kunvenigi teknikan Konferencon por la studo de la laborkondiĉoj en la karbominejoj. Tiu konferenco devis decidi en kiaj kazoj internacia reguligo estus ebla. La Konferenco, kiu kunigis delegitojn de la registaroj, de la industriistoj kaj laboristoj de la ĉefaj karboproduktantaj landoj de Eŭropo, kunvenis dum januaro 1930. Ĝi preparis la grandajn liniojn de akordo pri la daŭro de taga laboro en la minejoj. Tiun projekton la internacia Laborkonfereco perfektigis en ĝia dekkvara kunveno (junio 1930). Kvankam ĝi ne povis tute fini la studon de la problemo kaj devos repreni ĝin dum la proksima kunveno en junio 1931, oni povas forte esperi ke tiam ĝi povos prezenti al la registaroj konvencion kiu estos certe aplikebla al la karbominejoj de ĉiuj landoj, sed kiu estos sendube unue aplikata al la Eŭropaj karbominejoj.

### Interna navigado.

Alia problemo kiu prezentas tutmondan intereson, sed kiu samtempe postulas unue solvon en Eŭropo, estas tiu de la laborkondiĉoj ĉe la navigado sur grandaj riveroj. Internacia Konvencio pri tiu problemo estas necesa unue en Eŭropo, ĉar la grandaj internaciaj riveroj troviĝas en Eŭropo. Ilia geografia situacio postulas do reguligon de la laborkondiĉoj ĉe la du flankoj de la landlimoj kiujn ili trairas.

La internacia Labororganizo ekstudis la problemon en tia spirito, kune kun la internacia organizo por la komunikoj kaj transito de la Ligo de Nacioj. Komisio de specialistoj nomita de la Administra Konsilantaro kunvenis por studi kiuj laborproblemoj ĉe navigado sur grandaj internaciaj riveroj povus esti internacie reguligitaj. La komisio ekzamenis du aspektojn de la problemo: la labortagon kaj la sociajn asekurojn. Ĝi petis la internacian Laboroficejon ke ĝi preparu du raportojn pri tiuj du aspektoj. Tiuj raportoj estos prezentataj al la Komisio dum tiu-ĉi jaro, samtempe aŭ unu post la alia. La Komisio decidos poste ĉu estas eble proponi al la administra Konsilantaro meti unu aŭ ambaŭ aferojn en la tagordon de estonta kunsido de la internacia Laborkonferenco.

### Aŭtomata kunigo de fervojvagonoj.

La Internacia Transporto-Federacio postulis jam antaŭ kelkaj jaroj de la Internacia Laboroficejo ke ĝi studu la problemon de la antaŭforigo de la akcidentoj okazantaj dum kunigo de fervojvagonoj. Ĝi demandis ĉu ne estus eble anstataŭigi sur la grandaj eŭropaj fervojoj la kutiman mankunigsistemon per ia metodo de aŭtomata vagonkunligado kiel tiu jam utiligata en Usono kaj Japanujo. Denove tiu problemo, kiu estas tutmonda, tamen prezentas specialan intereson pro la bezono apliki en Eŭropo iu sistemon tian. La internacia Laboroficejo nomis specialan Komision, en kiu troviĝas reprezentantoj de la registaroj, de la grandaj eŭropaj fervojaj kompanioj kaj de la fervojistoj kaj ĝin komisiis studi la aferon.

Tiu Komisio kunlaboras kun la Internacia Fervoja Unuiĝo, kies konsilon ĝi regule petas pri la ekonomiaj, teknikaj kaj financaj flankoj de la problemo. Dum kunsido kiu okazis en februaro 1931, oni studis tiujn aspektojn de la tuta afero kaj alvenis al utilegaj praktikaj konkludoj en tiu kampo.

La tri ĉi-supraj problemoj interesas nur tri specialajn industriojn, sed tuŝas la interesojn de granda nombro da laboristoj; la Internacia Laboroficejo jam de longe studas ilin kaj oni povas juste diri ke, kvankam ne ekskluzive eŭropaj, ili prezentas tute specialan intereson por Eŭropo.

### Problemoj kun unuaranga intereso por Eŭropo.

Ni priparolos nun tri aliajn problemojn kiuj prezentas unuarangan intereson por la Eŭropa Kontinento; ili estas pli larĝaj ol la antaŭaj, sed ne koncernas specialajn laboristogrupojn.

*Elmigrado.*

Estas unue la problemo de la movoj de la laboristaj de unu lando al alia. Se tiu tre delikata kaj grava problemo povas esti solvata en la nuna momento, estas el Eŭropo ke la solvo devas veni. Ĉar por la movoj de kontinento al kontinento, kaj speciale de Eŭropo al Ameriko, la solvo ŝajnas bedaŭrinde tre malproksima.

La ideala solvo estas certe la libera cirkulado de la individuoj de unu lando al alia kaj ilia libera stabiliĝo sur ia loko de Eŭropa teritorio. Eŭropo ne estos vera Unuiĝo aŭ eĉ nura ekonomia unuiĝo antaŭ ol tia libereco de movadoj kaj stabiliĝo ekzistos, almenaŭ en Eŭropo mem. Sed se la stabiliĝo de tiu libereco devas esti ebla sen ekonomia danĝero por ĉiuj eŭropaj nacioj, ĝi ne devas esti lasita al la ŝanco aŭ al la interesoj de individuoj kaj eĉ de nacioj. Ĝi devas esti reguligita kaj sisteme organizata. Komenco jam ekzistas en tiu direkto, pere de duflankaj aranĝoj inter la plejmulto de eŭropaj ŝtatoj, aranĝoj kies nombro ĉiam pligrandiĝas.

La problemon jam studas la Komisio pri Migrado starigita de la Administra Konsilantaro de la Internacia Laboroficejo. Ĝi sendube estos baldaŭ enskribita en la tagordo de la internacia Laborkonferenco, kaj ni esperas ke tiu Konferenco akceptos ĝeneralan Konvencion fiksantan la ĉefajn normojn por la duflankaj aranĝoj, kiuj la ŝtatoj estos liberaj kontrakti aŭ ne kun aliaj ŝtatoj laŭdezire. Certe, tia konvencio estus ĝenerale aplikebla, sed estas verŝajne ke en la praktiko ĝi estos unue limigata al la eŭropaj nacioj. Estas eĉ eble imagi du Konvenciojn, unu por la labormovoj en la eŭropa kontinento, la alia por la labormovoj ekstereŭropaj.

La Internacia Laborоrganizo do jam ekzamenas la organizon de la migrado de la eŭropanoj en Eŭropo mem. Ne bezonas diri ĉi tie kiel ĉio kio tuŝas la protektadon de la migrantoj, ĉu en la lando en kiu ili alvenas, ĉu trapasante de unu lando al alia, estas atente studata jam de pluraj jaroj ĉe la Internacia Labororganizo. Ĝi okazigis jam plurajn rezoluciojn de la Konferenco.

*Protektado de la laboristoj en la eksterlando.*

Ekzistas tamen elementoj de tiu ĝenerala problemo kiuj precipe interesas la eŭropajn naciojn. Ni citos nur unu ekzemplon: La problemo de la kompenso pro laborakcidentoj al laboristoj eksterlandanaj por akcidentoj okazantaj sur la teritorio de iu ajn eŭropa lando, estas reguligita per internacia laborkenvencio akceptita ĉe la laborkonferenco de la jaro 1925 sur la bazo de egaleca traktado por eksterlandanoj kaj nacianoj. El la 26 ŝtatoj kiuj ratifis ĝis nun tiun konvencion, 22 estas eŭropaj ŝtatoj. Oni povas diri ke praktike ĉiuj eŭropaj ŝtatoj estas devigitaj per tiu ĝenerala konvencio.

Sed kiom pliklara kaj pli kontentiga estus, por la ŝtatoj kiel por la viktimoj de akcidentoj, se ekzistus akordo kiu, dum ĝi konformiĝus al la reguloj de la ĝenerala konvencio, samtempe harmoniigus la principon pri egaleca traktado kun la bezonoj kaj la eblecoj de la diversaj eŭropaj landoj. La ĝenerala konvencio mem, tamen, serĉas atingi solvon sur tiuj bazoj, ĉar ĝi lasas la decidon pri aplikado al specialaj akordoj inter la kontraktantaj partioj mem. Pro tio, en tiu afero kiel en multaj aliaj, la vojo traironta de la eŭropa Unuiĝo devos esti, ŝajnas al ni, la adapto de la ĝeneralaj reguloj al la specialaj cirkonstancoj kiuj rezultas el la pli forta solidareco ekzistanta inter la eŭropaj ŝtatoj. Plie, la laboro jam farita aŭ farota pri kompenso pro laborakcidentoj estos daŭrigata dum la proksima estonto per la studo de la konservado de rajto al pensio pro invalideco, maljuneco aŭ morto en la kazo de eksterlandaj laboristoj kiuj akiris en ia lando la rajton al pensio sed kiuj troviĝas, aŭ kies parencoj troviĝas, en alia lando ĉe la momento de la pago de la pensio.

*Senlaboreco.*

Senlaboreco nuntempe ekzistas en la tuta mondo, sed kelkaj el ĝiaj aspektoj estas precipe eŭropaj. Multaj el ĝiaj kaŭzoj estas ekonomiaj.

Oni jam de longe ekkonis, ekzemple, ke oftaj ŝanĝoj de la doganaj tarifoj igas subitajn ŝanĝojn ĉe la merkatoj kaj ĉe la produktado de multaj industrioj ekzistantaj en ĉiuj eŭropaj landoj. Eŭropa unuiĝo, eĉ se ĝiaj unuaj efikoj estus simple stabiligi la nunajn ekzistantajn tarifojn de la eŭropaj ŝtatoj, ebligus reguligadon de la komerco inter tiuj landoj kaj tiel forigus kaŭzojn de necerteco pri produktado kaj labordungado. Se plia paŝo estus farita per malaltigo aŭ eĉ kompleta forigo

de la tarifoj inter la eŭropaj landoj, kaj per kreado de Eŭropa Dogana Unuiĝo, la industriaj entreprenoj de tiu kontinento nedube trovus ne nur novajn eblecojn stabiligi sian produktadon en la granda interna merkato kiu tiel malfermiĝus antaŭ ili, sed ankaŭ eblecon realigi akordon inter ili por pli bona adaptado kun la entreprenoj de aliaj kontinentoj, kun la celo forigi malsanan konkurencon.

Oni ne devas kaŝi ke tia raciigo de eŭropa ekonomio signifus, almenaŭ por kelka tempo, la malapero de certaj « artefaritaj » industrioj, kiuj povis naski kaj kreski en certaj ŝtatoj dank'al la doganaj baroj kaj kiuj ne povus plu vivi post la alpreno de la sistemo de kompleta libera komerco. Tiaj konsekvencoj neeviteble malhelpos almenaŭ dum la unuaj jaroj la dungadon de multaj laboristoj. Ili postulas iujn kompenso- kaj adaptorimedojn por la protektado de la laboraj klasoj; ili postulas do la studon de laborproblemoj specialaj al Eŭropo. Certe, oni ne ankoraŭ atingis tiun staton: nune, la afero ankoraŭ estas en la studa periodo. Dum ĝia kunsido en septembro 1930, la kunveno de la Ligo de Nacioj komisiis la internacian Laboroficejon okupiĝi pri la afero. Sekve, la Administra Konsilantaro de la Internacia Laboroficejo petis al la Oficejo ke ĝi prezentu al ĝia senlaboreca komisio nombron da preparaj raportoj. Tio estis farita je la fino de januaro 1930, kiam la Oficejo prezentis al la Komisio sep preparajn raportojn pri la ĉefaj aspektoj de la problemo.

*Agrikulturo.*

Fine, inter la grandaj internaciaj problemoj nuntempe studataj de la tutmondaj organizoj, estas unu kiu prezentas speciale gravan intereson por Eŭropo: la agrikultura krizo.

Certe, tiu krizo estas verdire tutmonda. Sed tamen, ĝi estas speciala al Eŭropo en iu rilato, ĉar Eŭropo estas dispartigita unue en landoj ege industriigitaj, due en landoj kiuj estas preskaŭ nur agrikulturaj, kaj trie en landoj duon-industriaj aŭ duon-agrikulturaj (kiel Francujo kaj en iu mezuro Germanujo, Ĉeĥoslovakio, Svislando kaj Italujo) kiuj ne estas ligiloj inter la aliaj. En orienta kaj centra Eŭropo ekzistas agrikultura bloko kiu suferas de la nuna krizo kaj serĉas la savon en eŭropa organizado. La problemo estas plurflanka, sed la internacia laboroficejo devas povi diri sian vorton pri ĝi, pro tio jam ke ĝi devas scii en kia mezuro la nuna agrikultura krizo tuŝas la vivkondiĉojn de la terlaboristoj, farmistoj kaj malgrandaj terposedantoj (kiuj estas en iu mezuro ankaŭ laboristoj) kaj ankaŭ kiel kaj kiom ia solvo de la problemo ŝanĝus tiujn laborkondiĉojn. Dum la lasta kunsido de la komisio starigita de la Internacia Laboroficejo kune kun la Internacia Agrikultura Instituto, la Oficejo prezentis la problemon kaj konsultis la komision de specialistoj pri la vera naturo de la nuna krizo kaj pri ĝiaj efikoj sur la viv- kaj laborkondiĉoj de la terkulturista popolaro. Tiu laboro estos daŭrigata.

La supraj problemoj estas el la problemoj nun studataj de la Labororganizo, tiuj kiuj precipe tuŝas la interesojn de la eŭropa kontinento. Ekzistas aliaflanke certe multaj aliaj problemoj kies studon la Organizo ne ankoraŭ povis ekpreni ĝis nun.

En proksima artikolo, ni studos ĉu estus eble aŭ dezirinde starigi specialan eŭropan Laborarganizon ĉe la Internacia Laborarganizo por faciligi la studon de tiuj speciale eŭropaj problemoj.

---

## La ekonomia krizo en Usono kaj Kanado

S-ro H. B. Butler, la Vicdirektoro de la Internacia Laboroficejo, en raporto pri sia vizito al Kanado kaj Usono, de kie li lastatempe revenis, donas siajn impresojn pri la ekonomia situacio en Nordameriko.

En Usono S-ro Butler vizitis nur Washington, New York, Chicago kaj Philadelphia. En New York li estis akceptita de la Prezidanto kaj diskutis teknikajn problemojn kun la Sekretario de Laboro kaj kun eminentaj oficistoj de diversaj Registaraj Departementoj. Li estis konvinkita ke la Usonaj aŭtoritatoj komprenas la gravecon de internacia esplorado kaj internacia agado en la nuna krizo.

Oni kalkulas, ke la nombro da senokupaj laboristoj en Usono estas nun ĉirkaŭ 5.000.000. Ne ekzistas rimedoj kontraŭ senlaboreco, kun escepto de privataj bonfaraj organizaĵoj kaj la urĝaj aranĝoj lasttempe adoptitaj de komunumaj kaj ŝtataj aŭtoritatoj.

La rapideco de teknika progreso estis certe unu el la kaŭzoj de la nuna senlaboreco. De 1919 al 1929 la produkto per persono en fabrikindustrioj en Usono pliiĝis je 45 %, dum la nombro da personoj okupitaj je fabrikado malpliiĝis de 9.000.000 al 8.100.000. Simila malpliiĝo de la nombro okupata kune kun kresko de individua produktado troviĝas en minado, fervojoj kaj agrikulturo. Evidente, tiu malpli granda postulado por laboristoj rezultigos daŭrigon de la limigo de enmigrado, kio povos havi gravajn sekvojn en aliaj landoj.

Kontraŭe al tio, kio oni atendis, la altaj salajroj ŝajne ĝis nun bone sineltenis kontraŭ la krizo. Salajroj estis kelkafoje malpliigitaj, sed ne okazis ĝenerala movado por malaltigo de salajroj. La tuta sumo pagata por salajroj estis tamen malpliigita je ĉirkaŭ 9.000.000 doloroj ĉiujare, kaŭze de senlaboreco kaj mallongigo de laborhoroj. Tio nature malpliigas la aĉetopovon por nenecesaj aŭ luksaj komercaĵoj.

La mizero kaŭzita de la krizo modifas la ideojn antaŭe regantajn pri socia asekuro, kaj speciale pri senlaboreca asekuro. Ĉiam kreskanta opinio akceptas la necesecon enkonduki ŝtathelpon, kaj projektoj de ŝtathelpita asekuro estas redaktataj. Multaj spertuloj kredas, ke Usono, kiu jam akceptis kompenson pro akcidentoj, baldaŭ kreos aliajn specojn de socia asekuro, inkluzive asekuro kontraŭ senlaboreco, ne por la tuta nacio, sed por individuaj Ŝtatoj, kie la neceseco estas plej granda.

Ŝajnas ankaŭ, ke oni pli kaj pli komprenas, ke la ĉefaj ekonomiaj kaj industriaj problemoj ne povas esti traktataj en la limoj de iu nacio, sed ke internacia agado estas nepre necesa.

En Kanado la plej gravaj ŝanĝoj rezultas de la maŝinigo de agrikulturo, per kiu la kulturisto bezonas nur trionon aŭ kvaronon de la antaŭe necesa laboristaro, kaj kiu ankaŭ forigas multajn kulturistojn de malgrandaj bienoj, profite de grandaj industriigitaj entreprenoj. Tiuj fenomenoj, kune kun senlaboreco en la urboj, produktas fortan movadon kontraŭ enmigrado. Tio, verŝajne ne daŭros post la nuna krizo, sed sufiĉe longa tempo certe pasos antaŭ ol enmigrado en Kanadon atingos denove la nivelon atingintan dum la lastaj jaroj.

La paradokso de la nuna krizo pri tritiko nenie estas pli evidenta ol en la grenoproduktantaj provincoj de Kanado. La prezoj falis multe malsupre de la mezaj produktokostoj, kaj ne nur la rikolto de 1930, sed granda parto de la rikolto de 1929 ne estas ankoraŭ vendita. Sekve la kulturisto en Okcidenta Kanado estas en tre malbona situacio kaj ofte suferas veran mizeron, tial ke milionoj da senlaboruloj en Eŭropo ne havas monon por aĉeti panon.

Ĉie en Kanado montriĝis granda intereso pri internaciaj aferoj kaj kreskanta ŝato por la laboro de la Internacia Laboroficejo. Oni opiniis ke, ĉar la krizo rezultas grandmezure de internaciaj kaŭzoj, la Oficejo devas ludi gravan rolon en la studo de la problemo pri senlaboreco.

---

### La lernejaj kooperativoj.

Artikolo aperinta en la « Revue des Etudes coopératives » (Aprilo-Junio 1930) kunigas la dokumentojn haveblajn pri la lernejaj kooperativoj kaj montras la edukan laboron, kiun ili faras.

Ĉi tiu studo rilatas al la asocioj de lernantoj en unuagradaj kaj duagradaj lernejoj, asocioj kelkafoje ampleksantaj ankaŭ ekslernantojn, kaj el kiuj iuj estas tute aŭtonomiaj, dum la plej multaj estas malentrudiĝe kontrolataj de la instruistoj. La asocio administras ekonomian entreprenon por plenigi komunajn bezonojn de siaj membroj aŭ bezonojn de la lernejo, aŭ eĉ bezonojn de la loko aŭ distrikto. Tiaj asocioj ekzistas precipe, sed ne ekskluzive, en la kontinento Eŭropa. Estas ankaŭ la « kluboj de junaj kulturistoj » kaj « kluboj de junaj bestedukistoj », kiuj troviĝas speciale en la Anglosaksaj landoj.

Tiuj kooperativoj ekzistas pli malpli grandnombre en almenaŭ 19 landoj: Belgujo, Bulgarujo, Ĉeĥoslovakio, Francujo (ankaŭ en Franca Okcidenta Afriko kaj Kameruno), Granda Britujo, Hindujo, Hungarujo, Italujo, Kanado, Latvio, Litovio, Meksiko, Polujo, Rumanujo, la Sudafrika Unuiĝo, la Unuiĝo de Socialistaj Sovetaj Respublikoj kaj Usono. En iuj landoj ilia evoluado estas tre rimarkinda. Ekzistas 50.000 en U.R.S.S., 6.381 en Francujo, 5.000 en Usono, 1.000 en Polujo, 600 en Sudafriko, 270 en Hindujo, 200 en Latvio, ĉirkaŭ 100 en Granda Britujo, kaj oni povas kalkuli, ke la tuta nombro estas nuntempe ĉirkaŭ 60.000 aŭ 65.000.

*Agado, celo kaj funkciado de la lernejaj kooperativoj.*

La lernejajn kooperativojn oni povas konsideri kiel etajn aĉeto-, sparo-, vendo-, produktado- aŭ kulturokooperativojn. Ilia agado diversiĝas laŭ la landoj, la ekzistantaj bezonoj kaj iliaj celoj, kiuj estas iafoje komuna aĉeto de sapo, de lavotukoj aŭ de materialo necesa por la manlaboroj. Aliafoje, la celo estas la organizo de kooperativaj restoracioj, ŝparkasoj, libraroj, sportaj kaj teatraj societoj, lernejaj muzeoj, k.t.p., aŭ eĉ terkulturado, bredado kaj rearbarigo. La lernejaj kooperativoj plejofte okupiĝas pri pluraj el tiuj agadoj samtempe.

La ekonomia celo de la lernejaj kooperativoj estas ĉu havigi al la lernanto pli favorajn kondiĉojn, kaj tiamaniere malaltigi siajn elspezojn por la libroj, skribiloj, k.t.p., ĉu malaltigi la elspezojn de la lernejo mem. Ofte la lernejaj kooperativoj eĉ utilis al la tuta regiono kie ilia agado okazis: ni povus nomi lernejojn kiuj revivigis mortintajn metiojn, disvastigis pli bonajn metodojn por produktado, k.t.p.

Tio kio estas speciala al tiuj societoj, kompare kun la aliaj societoj de junuloj, estas ilia fundamenta aranĝo kaj ilia funkciado. Tiuj kooperativoj estas preskaŭ ĉiam veraj ekonomiaj unuoj, kies administrado estas lasita al la lernantoj mem, unuigitaj en vera asocio havanta siajn statutojn, kunvenojn kaj administrantojn. La instruistoj tamen plejofte kontrolas malentrudiĝe la aferon, kaj konsilas la infanojn kiam ili bezonas helpon.

*Ilia rolo en la edukado de la junuloj.*

Flanke de la ekonomiaj profitoj kiujn ili havigas al siaj membroj, la lernejaj kooperativoj estas valoraj kunhelpantoj de la instruisto je la pedagogia vidpunkto.

Ili estas, oni povus diri, « praktika realigo » de la ideo pri novaj lernejoj. Kiel oni vidos ĉi-sube, ilia kunhelpo al tiu progreso estas duobla.

Unue, la lerneja kooperado kunhelpas havigi al la lernejo la materiajn ilojn necesajn kun la modernaj metodoj de aktiva lernigo.

Due, ĝi estas, dank'al ĝia nura funkciado, ilo, metodo kaj ejo por spirita kaj morala formado. Laŭ la diroj de la instruistoj kiuj spertis la novan sistemon, ĝi estas ne nur forto kiu disvolvigas la konojn ricevitajn en la klasoj, sed ĝi ankaŭ donas al la lernantoj, dank'al praktikaj ekzercoj, diversajn novajn konojn (elementoj de ekonomio, ekzemple) kiuj ne troviĝas en la programoj de la unua-gradaj lernejoj.

Sed la plej utila efiko de la lernejaj kooperativoj estas eble la fakto ke ili malkovrigas kapablojn ne malkovreblajn per la lerneja laboro, ne nur intelektajn kapablojn kiel juĝo, konkreta pripensado, imago kaj ordo, kiuj formas kune la organizan talenton, sed ankaŭ afekciajn kapablojn, kiel arta sento kelkafoje, solidareco ĉiam, kaj fine karakterajn ecojn, kiel iniciativo, decideco, memmajstrado, respekto de si mem kaj de la aliaj, eklernado de la libereco, vekiĝo de la respondeco. La komuna agado de la infanoj en ilia kooperativo helpas ilin malkovri la veran signifon de disciplino; la riskoj kaj respondecoj de la administro alportas seriozan kaj praktikan elementon en la luda gvidadon de la aferoj ĉe la lerneja kooperativo.

Fine, la lerneja kooperativo montriĝas kiel speciale bona preparo por la socia vivo, ĉar ĝi estas vera socia ekzerco por la infano, sen tamen superi ĝian mentan staton.

### Kooperado ĉe la Universitato de Frankfurt-a/M.

La universitato de Frankfurt-a/M (Germanujo) nun posedas specialan Kooperado Instituto. Jam de kelkaj jaroj, kursoj pri kooperado estis faritaj en tiu Universitato. Dum printempo 1929, oni serioze diskutis, okaze de tia kurso, la eblecon starigi Instituton pri Kooperado. Oni komencis per la organizo de kooperada sekcio ĉe la jam ekzistanta instituto de ekonomiaj sciencoj.

Pli poste, diversaj profesoroj kaj kooperativistoj starigis « Helpan societon por la kooperado-instituto ĉe la Universitato de Frankfurt-a/M. » kiu devis ebligi morale kaj finance la kreon de la instituto. Tiu societo rapide progresis kaj ĉiuj fakoj de la kooperado estis baldaŭ reprezentataj en ĝi.

Dum oktobro 1930, la Prusa ministrejo de Sciencoj, Belartoj kaj Popola instruado kaj la Prusa ministrejo de la Kultoj permesis la starigon de speciala instituto pri kooperado ĉe la Universitato de Frankfurt-a/M.

La nova instituto estas centro por la scienca studo de la kooperada movado. Ĝi kreis arĥivojn kaj libraron, organizas kursojn kaj paroladojn, kaj faciligas ĉiamaniere la eldonon de sciencaj verkoj pri kooperado. Antaŭ nelonge, ĝi publikigis ekzemple verkon pri la revizo de kredito-kooperativoj. Kurson kiun ĝi organizis dum oktobro 1930 pri kontrolo de la librotenado ĉe la kooperativaj societoj ĉeestis 230 personoj.

La direktoro de la instituto estas S-ro Profesoro Hellauer; speciala komitato, en kiu troviĝas ankaŭ praktikuloj de la kooperada movado, kunhelpas en la direktado. Dank'al tiu sistemo, la aktiva kunlaborado de scienco kaj praktiko estas certigita.

L'IMPRIMEUR-GÉRANT: A. GRANCHAMP, 2, RUE DES USINES, ANNEMASSE